

**Centra Organo de Japana Esperanto-Junularo (JEJ)
Fondita en 1992 Landa Sekcio de TEJO**

La Junuloj

**7
2010**

**Nacia Kostumo de Tutmondo
Intervjuo: Andrei KOROBEINIKOV
Komikso / LERNEJ' LERNEJ'
Vendejo de Frostigitaj Mangajoj de Kato
Junulara Movado**

新役員決定

この度、新役員が下記の通り選出されました。役員一同、青年エスペランティストの交流と、活性化を目指して、邁進していきたいと思います。正会員の年齢は、JEJの存続が危機的な状況にあることを考慮し、これまで30歳未満のところ、35歳未満に引き上げました。また、役員ではありませんが、清水義益さんに、顧問としてJEJに関わっていただいています。

新役員

代表 岡部 明海
編集 藤森 耕平
書記 小泉 直樹
会計 谷島 博

「La Junuloj」次号より季刊発行

人手不足の中、継続的で質の高いものを維持するため、会誌「La Junuloj」を隔月発行のところ、季刊発行に変更させていただきたいと思ひます。何卒ご理解の程、よろしくお願ひ致します。

Anoncoj

Novaj estraranoj de JEJ estis elektitaj. Ni novaj estraranoj celas fortigi ligan de junaj esperantistoj, kaj plivigli iilan aktivecon. Ni estraranoj ŝanĝis aĝolimono de regula membro, de malpli ol 30 al malpli ol 35, pro la manko de aktivaj junaj esperantistoj en Japanio. Aldone s-ro SIMIZ Josijas, li ne estas estrarano, tamen kiel konsilanto subtenos JEJ.

Novaj estraranoj estas jene:

Prezidanto OKABE Akiumi
Redaktoro FUJIMORI Kohej
Sekretario KOIZUMI Naoki
Kasisto JAĜIMA Hiroŝi

“La Junuloj” aperis dumonate ĝis tiu ĉi numero. Sed ni aperigos ĝin trimonate de la venonta numero. Ĉar ni "eta" bezonas sufiĉan tempon por redakti kaj daŭre aperigi bonkvalitan gazeton. De la venonta numero, ĝi aperos en oktobro, januaro, aprilo kaj julio. Ni esperas, ke vi akceptos la decidojn kaj ŝanĝojn supremenciitajn.

執筆者紹介 - gajagaja



藤森耕平
FUJIMORI Kohej
Nacia. Hostumo de Tutmundo
... P.2

Se vi daŭros esperanton, iam ni renkontiĝos.



林幸子
HAJAŜI Saĉiko
Vendejo
de
Frostigitaj Mangaĵoj
de
Kato ... P.6



JAĜI
Intervjuo: Andrei Korobeinikov
... P.3-4
LERNEJ' LERNEJ'
... P.5

Desegni komikson fariĝis iom ĝoje por mi.



清水義益
SIMIZ Josijas
Promenanta Esperanto
... P.7

Esperanto estas trezoro de vivo.

会費振込

郵便振替口座: 00140-8-755070
加入者名: JEJ

会費:
正会員 (35歳未満) 1500 円 / 年
高校生まで 400 円 / 年
新規入会者 750 円 / 年 (初年度のみ)
賛助会員 (35歳以上) 2000 円 / 年

Ĝiri kotizon

Japana poŝtoĝira konto, Numero: 00140-8-755070
Nomo de konto: JEJ

Kotizo:
Regula membro (malpli ol 35-jaraĝa) 1,500 enoj / jaro
Ĝis altlernejano 400 enoj / jaro
Novmembriĝinto 750 enoj / jaro (nur en la unua jaro)
Subtenanto (35-jaraĝa kaj pli) 2,000 enoj / jaro

ご意見・ご感想を

上記の決定・変更に関して、本来は正会員の間の投票が必要ですが、JEJの現況を踏まえ、このような形で発表させていただきました。ご意見・異議のある方は下記宛先までお知らせ下さい。また、『La Junuloj』のご感想、記事の投稿も随時募集しています。

会費を振り込んでいただいた方には、領収書を同封しています。

La Junuloj 2010年7月号 (n-ro 87)

2010年7月1日発行

編集 岡部 明海

発行 日本青年エスペラント連絡会

〒162-0042 東京都新宿区早稲田町 12-3

エスペラント会館 気付

メールアドレス:
jej_kontakto@yahoogroups.jp

ウェブページ: <http://www.jej.jp>

La Junuloj julio 2010 (n-ro 87)

La 1an de julio, 2010 eldonita.

Redakto Akiumi OKABE

eldono: Japana Esperanto-Junularo

JP-162-0042, Wasedamati 12-3,

Sinzuyuku-ku, Tokio, Japanio

Ret-adreso:
jej_kontakto@yahoogroups.jp

TTT-ejo: <http://www.jej.jp>

Ni atendas vian opinion.

JEJ devas okazigi oficialan balotadon pri decidoj kaj ŝanĝoj supremenciitaj. Tamen ni ne povas okazigi ĝin sub iom konfuzita situacio de lastatempa JEJ. Pro tio, ni anoncas ĉi tiel. Se vi havas ian opinion pri la anonco, bonvolu sendi mesaĝon al la adreso sube skribita. Ni ĉiam atendas vian opinion pri "La Junuloj", kaj ankaŭ vian artikolon por ĝi.

電子版・音声版について

今号の電子版・音声版を試験的に公開しています。詳しくは左記JEJのホームページをご覧ください。

PRI RETA KAJ SONA VERSIO

Ni prove publikigas retan kaj sonan version de ĉi tiu numero. Bonvolu viziti al retejo de JEJ (skribita maldekstre).

Nacia Kostumo de Tutmondo

MIĜI MORI KOLEJ

La 2a fojo Galabejo

世界の民族衣装

～第2回 カフタン～

世界中の魅力的な民族衣装を紹介する

“Nacia Kostumo de Tutmondo”

第2回は、トルコの民族衣装カフタンを取り上げます。カフタンの構造や素材、そして夏用と冬用のカフタンの違いなどを紹介します。着物が前で重なり合う部分の生地、衿（おくみ）も出てきます。

Kaftano estas turka tradicia kostumo. Oni vestas sin per kaftano sur la dorson kaj metas unu frontoparton de la korpo sur la alian. La frontoparto de la korpo kiuj estas faritaj el nodita laĉo. Kaftano ne havas kolumon aŭ havas malgrandan starantan kolumon kaj longajn manikojn aŭ duonajn manikojn. Flankoj de la basko de kaftano estas tajlitaj. Kelkaj kaftanoj duonmanikaj havas aldonajn manikojn kiuj estas dividitaj de la korpo.

Koloro de kaftano estas tre diversa kaj pompa. Granda parto de kaftanoj estas farita el ornamita ŝtofo. Kaj kelkaj havas strion. Cetere kelkaj kaftanoj estas orkoloritaj.

Ankaŭ materialo de kaftano estas diversa. Kaftano por somero estas farita el silko. Kaftano kontraŭ malvarmeo havas peltan subŝtofon. Kelkaj kaftanoj estas faritaj el vatita ŝtofo.

Oni vestas sin per subĉemizo kaj ŝalvaro (shalwar) sub kaftano. Ŝalvaro estas tre dika pantalonon. Oni vestiĝas per ŝalvaron laĉante la talion.

Kaftano por ceremonio estas farita el or- kaj arĝent-fadenoj. La basko kaj manikoj estas tiom longaj kiom atingi ĝis planko. Kaj frontoparto de manikradiko estas tajlita. Oni eligas siajn brakojn el la tajlito kaj pendigas manikojn.

Esenco de kaftano estas longbaska ĉemizo. Sed plej malsama punkto ol ĉemizo estas ekzisto de "okumi". Okumi estas peco de frontoparto de japana Kimono. Okumi estas pecŝtofo etendita por supermeti unu frontoparton sur la alian. Kaftano havas okumi-on de la talio ĝis la basko.

VORTOJ

turk-a : トルコの
dors-o : 背中
korp-o : 身頃
nod-it-a : 結ばれた
laĉ-o : 紐
kol-um-o : 衿
manik-o : 袖
bask-o : 裾
pomp-a : 派手な
ornam-it-a : 柄の入った
or-kolor-it-a : 金色に染められた
silk-o : 絹
pelt-a : 毛皮の

sub-ŝtof-o : 裏地
vat-it-a : わた入りの
pantalon-o : ズボン
tali-o : ウエスト
ceremoni-o : 儀式
arĝent-o : 銀
faden-o : 糸
manik-radik-o : 袖付け
brak-o : 腕
pend-ig-i : ぶら下げる
ekzist-o : 存在
pec-o : かけら
etend-it-a : 拡張された



Intervjuo: Andrei KOROBAINIKOV

La 2a fojo

Intervjuinto: Ja ĝi, Akiumi OKABE



ロシア人ピアニストでエスペ란ティストのアンドレイ・コロベニコフさんをご存じでしょうか？ 国際的なコンクールで優勝し、世界を飛び回って活動している新進気鋭の若手ピアニストです。日本での公演活動は、エスペ란ティストが支えています。今年の5月に音楽祭で来日した折、La Junuloj 編集部は、彼にインタビューしました。忙しいスケジュールの中、アンドレイさんは、何でも気さくに話してくれました。今回は、その中からエスペラントにまつわる質問と回答をまとめました。エスペラントはとても美しく、歌を奏でるようだと言表する彼。いったい何日ぐらいでエスペラントを学んだのでしょうか？彼の今後の活躍に目が離せません。

Andrei Korobeinikov kaj Esperanto

Ĉu vi konas 'Andrei Korobeinikov'? Li estas 24-jara rusa pianisto. Li ludas tra la tuta mondo, ankaŭ en Japanio multe, kaj sololude kaj kun famaj orkestroj. Kaj plie li estas ESPERANTISTO!

Feliĉe, al ni, redakcio de "La Junuloj", venis ŝancoj aŭskulti lian recitalon en klaskmuzika festivalo 'LA FOLLE JOURÉE au JAPON 2010' en majo de tiu ĉi jaro, kaj eĉ intervui lin dum ĝi.

Ni unue prezentu lin iomete.

Li naskiĝis en 1986, en la urbo Dolgoprudnij en la Moskva Regiono, Rusio. Li ekludis pianon en 1991. En 1994 li gajnis la 1an premion en Tut-Rusia Interregiona Konkurso de Junaj Muzikistoj je la nomo de P.I.Ĉajkovskij. Ekde tiam li estis premiitaj en multaj konkursoj. En 2001 li ekstudis en la Moskva Ŝtata Konservatorio je la nomo de P. I. Ĉajkovskij. Tiam lia aĝo, 15-jara, estis la minimuma por eniri tiun ĉi muzikan universitaton. Tie li diplomiĝis en 2006 kun rekorde bela rezulto. Dum sia studado, en 2004, li gajnis la 1an premion en la 3a Internacia Konkurso de Pianistoj je la nomo de A.N. Skrjabin. En sekvanta jaro, li gajnis la 2an premion kaj la premion de publiko en la 2a Internacia Konkurso de Pianistoj je la nomo de S.V. Raĥmaninov. Li agadas kiel pianisto internacie, kaj ludas en multaj koncertoj inkluzive de tiuj en Esperanto-eventoj. Nun li havas ĉirkaŭ 40 koncertojn en unu jaro.

Dume, li eniris en la Eŭropa Jura universitato en 1998 (tiam li estis 12-jaraĝa!), kaj finis la studon en 2003 kaj eĉ sukcesis en la ŝtata ekzameno de justicoficisteco. De 2003 ĝis 2004 li lekciis en tiu ĉi Universitato. Tamen lastatempe liaj profesiaj agadoj koncentriĝas al muziko.

Fakte li estas iom 'speciala' homo. Sed al niaj demandoj, li facilanime respondis tagmanĝante Teiŝoku (fiksa menuo) de bakita fiŝo, kaj rakontante pri subitaj planŝanĝoj en tiu ĉi festivalo. Lia parolo estas, laŭ nia impresio, tia, kian 'ordinara' (sed fakte diligenta kaj talentabunta) juna laboristo faras.

Do, ni temis, kio estas Esperanto por li. Li rakontis, ke li lernis ĝin en la Eŭropa Jura universitato.

Redakcio : Kia estis tiu leciono?

Andrei : Unue, mi temas pri la universitato. Ĝi estas tute speciala organizaĝo. Ne ŝtata. Fondita post la ŝanĝaj jaroj en Rusio. La fondinto estis la rektoro, prf. Gennadij Ŝilo. Li aranĝis kelkajn lekciajn ne tradiciajn. Tiu universitato estas ligita kun Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino, kies laborlingvo estas Esperanto.

Tiu leciono de Esperanto faciligas al ni lerni aliajn lingvojn. Ni lernis E-on 10 tagojn. Poste mi jam povis babili kaj sinesprimi.

R : Nur 10 tagoj?

A : Jes. Speciala kurso de prf. Ŝilo.

R : Kia estis tio?

A : Fakte, tuto de leciono estis de gramatiko kaj unu leciono estis nur 1 horo. Post tio, ekzerco, ekzerco, ekzerco kaj ekzerco. Kaj skribi, babili. Tio estis kvazaŭ malgrandaj spektakloj por vidigi lernadon de E-to. Tre efika kurso.

R : Ĉu estis ia impresiga afero pri tiu kurso?

A : Mi memoras, ke li igis nin interesiĝi pri ideo, karaktero de Esperanto, pri lingvo mem. Estis interese por ni, ĉar kurso estis konstruita tre interese por lernantoj. Ne estas tiom didaktika. Ekzemple, estas tre interesa tasko. Fari diversajn vortojn pri la amo. Mi faris 150.

R : Ekzemple kiaj?

A : Ekzemple... 'fi-amo' ankaŭ povas esti tia amo, ĉu ne? (rido) Sed ĝi estas ne tradukebla eĉ en la rusan lingvon. Kun ĉiuj ebloj, sufiksoj, prefiksoj, ktp, ni faris tiajn.

Krome, mi memoras, ke ankaŭ iu demandis, kial Esperanto ne tiel multe havas malbonajn vortojn. Tiam prf. Ŝiro proponis al ni fari malbonajn vortojn el esperantaj vortoradikoj. Rezulte, estis farita la vorto 'fi-aĉ-ulo'. (rido) Li estis bona instruisto. (rido)

R : Ĉu vi akiris vidpunkton aŭ specialan vidkampon lerninte Esperanton?

A : Fakte, eble post mia partopreno en UK, miaj vidpunktoj eĉ pri homaro kaj lingva problemo vere ŝanĝiĝis. Kaj, Esperanto estas por mi kvazaŭ iu speco de beletro. Fakte ĝi estas vere mirinda lingvo, mirinde farita. Por mi, uzado de ĝi estas ĝuo.

R : Ĉu vi pensas, ke Esperanto sonas bele?

A : Jes. Sed, por mi, fakte la plej bela lingvo estas la itala. Ĝi estas tute belega. Laŭ mia impresio, Esperanto estas kantema simile al la hispana. Esperanto similas ankaŭ al la rusa, se temas pri prononco.

R : Pri Esperantaj eventoj. En kiuj eventoj vi ludis?

A : Mi partoprenis kaj ludis en UK en Zagrebo, Gotenburgo, Pekino, Florenco. Mi ludis ankaŭ en kelkaj renkontiĝoj en Rusio kaj rusaj kongresoj. En Rusio, mi partoprenis vojaĝon. Ni iris ege kamparan lokon, kie tute ne estas domoj. Kvankam partoprenantoj estis nur rusoj kaj ukrainoj, oni multe parolis Esperante. En Japanio, Japana Kongreso en Inujama, en 2004.

R : Kian impreson vi havis en tiaj eventoj.

A : Impreso estas bonega. Libera etoso, iu loko, iu renkontiĝo, kien homoj venas por paroli Esperanton kaj ĝui, kiel vi vidas. Mi memoras, ke okaze de Florenca UK, en 2006, mi sentis min estanta en iu ĝardeno. Kiel mirinda pejzaĝo tio estis! Tie ĝuantaj homoj parolas nur komunan lingvon. Tio estis fantastika. Mi neniam vidis kverelojn en tiaj eventoj.

Li diras, ke li lastatempe ne havas tempon por ĉeesti en Esperantaj eventoj. Tamen, ekzemple en Japanio, estas tiuj, kiuj subtenas lin uzante Esperanton. (Fakte pro tio tiu ĉi intervjuo realiĝis.) Ankaŭ de nun lia laboro estos atentinda ne nur por muzikamantoj, sed ankaŭ por Esperanto-subtenantoj.

Андрей
Кородеиников

VORTOJ

A : アンドレイ R : 編集部 (redakcio)

rus-a : ロシアの ŝanc-o : チャンス

'LA FOLLE JOURÉE au JAPON 2010' : ラ・フォル・ジュルネ・オ・ジャポン「熱狂の日」音楽祭 2010

Ĉajkovskj : チャイコフスキー Skrijabin : スクリャービン Raĥmaninov : ラフマニノフ

ekzamen-o de justic-oficist-ec-o : 司法試験 lekci-o : 講義 facil-anim-e : 気さくに


subit-a : 突発の talent-a-bunt-a : 多彩な rektor-o : 学長 sin-esprim-o : 自己表現 ekzerc-o : 練習

didaktik-o : 教授法 fi- : くそつ sufiks-o : 接尾辞 prefiks-o : 接頭辞 -aĉ- : 悪い vid-punkt-o : 視点


vid-kamp-o : 視野 spec-o : 種類 beletro : 文学 kamp-ara : 田舎の etos-o : 気品 pejzaĝ-o : 風景 kverel-o :

口論 atent-ind-a : 注目に値する muzik-am-ant-o : 音楽愛好者 sub-ten-ant-o : 支持者

3



4



JAGI

Vendejo de Frostigitaj Mangĝaĵoj de Kato

HAJASI Saĉiko

第2回目の『ねこのれいとう食品店』。出版社からの帰り、落ち込んでいた青井さんでしたが、道角で見たことのないお店を発見。愛想のいいねこの店員が無料だと言うので『思い出』という、れいとう食品をもらいました。



S-ro Aoi revenis al sia malvasta ĉambro de la apartamento kaj tuj poste li komencis elfrostigi la mangĝaĵon. Jen laŭ la bolo de la akvo, vaporo plenplenigas la ĉambron kaj blankigis la ĉirkaŭon. Li vidis nenion.

"Ki, ki, ki, kio okazas?!"

Sed S-ro Aoi tute ne konfuziĝis.

Dum li atendis senmove, la blanka vaporo pli kaj pli malaperis... Ho, s-ro Aoi trovis sin en la kuirejo en sia naskiĝloka malnova hejmo. Take, la kato, suprenrigardas al s-ro Aoi ĉe liaj piedoj.

"Ha, Take! Ĉu vi ne jam mortis?"

Take rigardis s-ron Aoi, proksimiĝis al li karese, kaj poste elkuris eksteren rapide. S-ro Aoi tuj sekvis ĝin kiel antaŭe en sia knabeco. Take kuras kaj kuras. S-ro Aoi ne scias, kien Take iras. Finfine, Take haltis kaj turnis sin malantaŭen.

Jes, la loko estas la senfunda marĉo kie eta Take dronis. Kiam s-ro Aoi estis lernanto de elementa lernejo, li savis ĝin. Post tiam li kaj Take ĉiam estis kune

La marĉo restas kiel antaŭe.

Kiam s-ro Aoi enrigardis en la marĉon kaj vidis sian vizaĝon sur la akvo, li trovis sin knabo.

"Ho! Kio okazis?"

Malantaŭ lia vizaĝo en la akvo, vastiĝas tiama pure blua ĉielo kies koloro estas kiel klara akvo.

"Take! Ni iru al glanmonto."

Glanmonto estas la loko, kien s-ro Aoi ofte iris kun Take, kiam li estis infano. Tie estas la "Bazo", kiun li faris kun siaj amikoj. Tiu "Bazo" inkluzivas pajlan liton, kuirejon kun pato forlasita pro rustiĝo sur plata roko kaj eĉ necesejon desegnitan per arbobranĉo. Plue trapezon penditan de branĉo de granda pino. La kalva monto, kie oni povas manĝi akebiojn, glanojn kaj montvinberojn. Proksime senfunda marĉo, kie oni prenas grandajn kankrojn. S-ro Aoi kuradis kiel en sia infaneco.

Iom post iom kolektiĝis Juĉjo, Teĉĉjo, kaj Manjo ĉirkaŭ li.

Ili kaj kverelis kaj amikiĝis... ĉiuj estis la karaj geamikoj.

Daŭrigota

VORTOJ

Elfrost-ig-i : 解凍する vapor-o : 湯気 proksim-iĝ-i kares-e : すり寄る
marĉ-o : 沼 glan-mont-o : どんぐり山 baz-o : キチ (基地) lit-o : ベ
ッド trapez-o : ブランコ kalv-a : はげた kankr-o : ザリガニ
Ju-ĉj-o : ゆうくん Teĉ-ĉj-o : てっちゃん Ma-nj-o : まあちゃん
kverel-i : ケンカする

